

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1193 (1/2025)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana
Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

BIBLIOTECA DI MASSA

<https://reprobi.erasmo.it>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** (è di nuovo il codice della FEI!)

Indice articoli

Faru fajron en la kamen'	2
Adiaŭ, Renato	2
Ugo! Kial?	3
IEJ ĝoje invitas al la 48a IJF	4
Frapelli, plie	4
Quote sociali, congressuali, per abbonamenti per il 2025	5
Ĉu vi ŝatas traduki?	9
Konkurso Ĝanfranko	10
He, tio ne okazus, se oni uzus esperanton	11

FARU FAJRON EN LA KAMEN', VENAS MI AL HEJM'

Estimata gelegantaro, mi devas pardonpeti pro la longa, plurmonata, malĉeesto. Pro neklarkiala infektego, mi enhospitaliĝis kvinfoje, ensorbis tioman kvanton da antibiotikoj, antihistaminaĵoj, kortizono, ke iam flegistino diris ke, se mi estus blovanta aeron kontraŭ iun, mi estus certe tiun resaniganta, riskis fariĝi Unubraka Norbi, sed, fine kaj finfine, resaniĝis. Kaj jen denove mi, por vi. Bonan legadon.



ADIAŬ, RENATO



Per unusola koro, tra la tuta mondo, esperantistaro hodiaŭ ploras. Mortis Renato Corsetti, la plej eminenta esperantisto kiun mi havis la plezuron koni, kun kiu mi kunlaboris, kaj kies laboron mi ĉiam, senescepte, admiris.

Lia mildeco, kiu aperas ankaŭ en la supra bildo, kun la edzino Anna Loewenstein, estis flanko de lia karaktero kiu distingis lin, eĉ en la plej malfacilaj momentoj de lia movadumado. Li estis esperantologo, verkis kurslibrojn, tradukis tekstojn kaj kanzonojn, organizis movadajn aferojn (ekz, la programo "Kiu faru kion?" por la Jubilea Jaro 1987, detala ĝis la lasta komo), kongresojn, asociojn; li prezidis ĉion prezideblan, de IEJ, TEJO, IEF, UEA, ĉiam kun la ideo fari tiel ke homoj kunlaboru entuziasme al komuna celo, anstataŭ kvereli pri bagateloj. Li vidis sintezojn tie, kie aliaj vidis abismojn. Kaj kapablis gvidi al tiuj celoj, al tio, kio pleje, en la cirkumstancoj, estus bona por la movado. Li estis majstro je ironio, kiel liaj artikoloj en la revuo *La KancerKliniko* pruvis. Kaj li estis majstro pri homaj rilatoj; kunlabori kun li ĉiam estis inspira al pliaj agadoj, al pliaj ideoj, al io plia.

Renato, mi enamiĝis al Esperanto danke al Raymond Schwartz, sed ties idealo penetris ĝisoste en min danke al vi.

Kaj nun, ni ĉiuj havas la taskon daŭrigi vian laboron, por ke vi estu fiera pri ni.


Amike

Norberto

UGO! KIAL?



La maldekstrajn lipharojn ĉiu esperantisto konas perfekte, kaj ĉiu el ni revas havi la eblecon paroli kun li, sed tio ne plu eblas. La dekstrajn lipharojn multaj italaj esperantistoj havis la okazon koni kaj aprezi, sed, same kaj bedaŭrinde, ne plu estas ebleco ĝui interparolon.



Ugo Tonini, longtempa esperantisto, bela kaj hela persono, helpema, serioza sen esti teda, aktiva kaj entuziasma, nin lasis post abrupta sanproblemo. Lin mi konis relative malfrue, kiam mi revenis el mia kabeiĝo, sed tuj aprezis liajn sintenon, konduton, labormetodon, sincerecon: ni strikte kunlaboris ĉe la revuo, kie li estis (doloras uzi la preteriton) la

empaĝiganto, kaj mi la redaktoro. Aserti, ke niaj rilatoj estis "viglaj", estas ĉarma eŭfemismo, sed ĉiam absolute korektaj kaj rezultoplenaj: el li mi multon lernis, ĉefe la metodon reprikonsideri la faritaĵojn, por kuraĝe alfronti novajn vojojn. Dankon, Ugo, tutelkore: dum tiu telefonvoko, kiun ni ne sciis estos la lasta, ni planis farotaĵojn, korektojn al faritaĵoj, kaj reviziojn al farataĵoj. Vi klarigis al mi, plurfoje, kiom belas aldoni vivon al la jaroj, ol jarojn al la vivo. Tiu, kun kiu oni konstruis mirindajn rememorojn, neniam mortos.

"Sur la ŝildo staras: *Ne mistretu tiujn ĉi florojn!* Sed por la vento tio senutilas: La vento ne kapablas legi".

Norberto Saletti

IEJ ĜOJE INVITAS VIN AL LA 48-A INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO!

Venu esperantumi kun ni dum la ĉi-jara Paska semajno, de la 17-a ĝis la 22-a de aprilo 2025, en Torricella di Magione (PG), ĉe Lago Trasimeno, en la pitoreska regiono Umbrio, kun ĝiaj belaj pejzaĝoj kaj unika kulturo.


Riĉa programo atendas vin, kun atelieroj, prelegoj, kaj multaj aliaj aktivaĵoj; koncertoj por ĝui muzikon kaj festi kune, ekskursoj al Lago Trasimeno kaj la urbo Perugia, kun vizito al la fama fabriko de la "Baci Perugina", por malkovri la sekretojn de la ikonecaj ĉokoladaĵoj.

Kaj ne forgesu pri postkongresa ekskurso al Florenco! Ĉi-jare la fokuso estos pri artefarita inteligenteco, kun prelegoj kaj programeroj prie! Ĉu vi pretas por semajno plena je Esperanto, kulturo kaj amikeco? Aliĝu al la 48-a IJF! Por pliaj informoj kaj aliĝo, sekvu niajn kanalojn aŭ skribu al nia retadreso (iej@esperanto.it)

Ni antaŭĝojas renkonti vin kiel eble plej baldaŭ!

FRAPELLI, PLIE

Francesco Pignatelli (Frapelli), kiu mortis pasintjare, estis ankaŭ lerta tradukisto de kanzonoj. Jen lia versio de belega kanzono de Mia Martini, "Almeno tu nell'universo".



QUOTE SOCIALI, CONGRESSUALI E ABBONAMENTI A PERIODICI PER L'ANNO 2025

*Per ottemperare a quanto previsto dal regolamento UE 2016/679 è indispensabile avere dai nuovi soci la conferma al trattamento dei propri dati identificativi e della ricezione dell'informativa sul trattamento degli stessi. E' stata pertanto predisposta l'apposita: "INFORMATIVA AL TRATTAMENTO DEI DATI".

L'informativa dovrà essere consegnata al nuovo socio all'atto dell'adesione. Una copia della stessa, con i dati del socio e firmata dallo stesso, dovrà essere spedita alla FEI con la quota.

QUOTE SOCIALI FEI per l'anno 2025

Si raccomanda di inviare le adesioni con sollecitudine specificando sempre se si tratta di rinnovo o di nuovo iscritto.

categoria	rivista	quota a FEI	per i gruppi ³	
			a FEI	al gruppo
<i>Socio ordinario</i>	PDF	30,00 €	22,50 €	7,50 €
	cartacea	35,00 €	26,25 €	8,75 €
<i>Socio familiare</i> ¹	PDF	15,00 €	11,25 €	3,75 €
<i>Socio giovane</i> ²	PDF	15,00 €	11,25 €	3,75 €
	cartacea	17,50 €	13,12 €	4,38 €
<i>Socio sostenitore</i>	PDF	90,00 €	67,50 €	22,50 €
	cartacea	105,00 €	78,75 €	26,25 €
<i>Socio garante</i>	PDF	300,00 €	225,00 €	75,00 €
	cartacea	350,00 €	262,50 €	87,50 €
<i>Gruppo</i>	cartacea	-	10,00 €	-

- 1) I soci familiari devono avere lo stesso recapito del socio di riferimento.
2) I giovani che nell'anno 2025 non compiono ancora i 25 anni (nati dopo il 31.12.2000) comunicando la data di nascita pagheranno la "quota ridotta per giovani".
3) I gruppi che prevedono di raggiungere i 10 soci versano la quota di Gruppo e possono trattenere per ogni quota sociale il seguente importo.

Si ricorda che:

- A partire dal secondo numero dell'anno, la rivista "L'Esperanto" verrà inviata solo ai soci in regola con il pagamento della quota. Gli arretrati non verranno spediti ai ritardatari.
- I dati personali dei soci verranno utilizzati dalla segreteria esclusivamente per l'invio delle comunicazioni e delle informazioni riguardanti la nostra attività nel rispetto del Regolamento UE 679/2016.
- Tutti i soci fino a 35 anni (nati dopo il 31.12.1990), che comunicheranno la data di nascita, saranno considerati anche soci della sezione giovanile IEJ (Itala Esperantista Junularo).

È possibile effettuare la richiesta direttamente in Rete, compilando il modulo presente a questo link: <https://forms.gle/NkWuiYtHSMqE8MSA>

CONGRESSO ITALIANO DI ESPERANTO

Il congresso italiano di esperanto si terrà nel 2025 a Salsomaggiore Terme (PR) dal 23 al 30 agosto. Il tema congressuale sarà **Esperanto: la lingua giusta per la scienza** e già come negli scorsi anni vanta di una presenza veramente internazionale.

Alla pagina Internet kongreso.esperanto.it/91 sono già disponibili ulteriori informazioni sul programma, sugli alloggi e sulle iniziative speciali, come il piccolo congresso per bambini: sotto la guida di insegnanti, professionisti e volontari, i vostri giovani esperantisti trascorreranno giornate piene di gioco, apprendimento e amicizia con coetanei di tutto il mondo.

Queste le quote per la partecipazione, divise per categorie e per periodi:

Categoria	Piena*	Scontata**	Giovani dai 13 ai 25 anni***
<i>1° periodo (fino al 28 febbraio 2025)</i>	90 €	50 €	15 €
<i>2° periodo (fino al 31 maggio 2025)</i>	110 €	60 €	15 €
<i>3° periodo (fino al 31 luglio 2025)</i>	130 €	70 €	15 €
<i>4° periodo (dal 1° agosto e sul posto)</i>	140 €	80 €	15 €
<i>Quota giornaliera</i>	30 €	30 €	5 €
<i>Programma bambini</i>	120 €	-	-

* Categoria piena: italiano o straniero abitante in Italia, membro FEI per il 2025 (se non membro deve pagare la relativa quota associativa).

** Categoria scontata: straniero (non abitante in Italia), familiare di congressista iscritto alla FEI, giovane (se nato tra il 1/1/1996 e il 31/12/2000), portatore di handicap.

*** Giovani 13-25: nati tra il 01/01/2001 ed il 31/12/2012.

Categoria gratuita: bambini sino ai 12 anni (nati dopo il 1/01/2013) ed accompagnatori di portatore di handicap.

QUOTE U.E.A. PER L'ANNO 2025

Le quote sono rimaste invariate rispetto allo scorso anno per favorire una adesione numerosa all'UEA di tutti gli esperantisti! Vi invitiamo pertanto a favorire l'adesione dei vostri soci anche all'UEA: grazie.

MA-(T)	Membro individuale con rivista "Esperanto" cartacea	€ 74,00
MB-(T)	Iscrizione base con Jarlibro e rivista Esperanto in rete (pdf) ...	€ 44,00
MB-50%	giovane fino a 25 anni	€ 22,00
MB-75%	giovane fino a 19 anni	€ 11,00
DMB	Iscrizione base a vita.....	€ 1.320,00
DMA	Membro individuale a vita	€ 2.220,00
SZ	Adesione alla Società Zamenhof	€ 148,00
PT	Membro Patrono di TEJO (con "Kontakto").....	€ 88,00
DPT	Patrono a vita di TEJO con tutte le pubblicazioni di TEJO.....	€ 2.640,00
DP	Patrono a vita della UEA con la rivista "Esperanto"	€ 2.200,00
SA	Semplice abbonamento alla rivista "Esperanto"	€ 45,00
K-TO	Abbonamento alla rivista "Kontakto"	€ 25,00

"-(T)" indica che i soci fino a 29 anni che comunicheranno la data di nascita riceveranno anche la rivista "Kontakto".

ISCRIZIONI E ABBONAMENTI A PERIODICI per l'anno 2025

È possibile effettuare la richiesta direttamente in Rete, compilando il modulo presente a questo link: <https://forms.gle/mFyK9bMtY5MSAzY59>

NB: Non essendo prevista la spedizione di eventuali arretrati, si raccomanda vivamente di far pervenire al più presto gli abbonamenti ai periodici.

Pubblichiamo l'elenco delle iscrizioni e degli abbonamenti ai periodici fino ad oggi pervenuti, che verrà aggiornato di volta in volta nei prossimi numeri della rivista. Qui di seguito le formule di abbonamento attualmente disponibili. Per formule non comprese nell'elenco sottostante, si prega di contattare prima la segreteria. Le lettere C e D significano rispettivamente "cartaceo" e "digitale".

Internacia Pedagogia Revuo + aliĝo al ILEI + Juna AmikoC	€ 40,00
Internacia Pedagogia Revuo + aliĝo al ILEIC	€ 25,00
Internacia Pedagogia Revuo + aliĝo al ILEID	€ 12,50
Internacia Pedagogia RevuoC	€ 30,00
Juna Amiko.....C	€ 18,00
Juna Amiko (ek de 3 kopioj sama adreso)C	€ 15,00
Juna Amiko.....D	€ 11,00
Katolika Penso + aliĝo al UECI (socio ordinario).....C	€ 25,00
Katolika Penso + aliĝo al UECI (socio giovane).....C	€ 11,00
Katolika Penso + aliĝo al UECI (socio sostenitore).....C	€ 50,00
Katolika PensoC	€ 15,00
Espero Katolika + aliĝo al UECID	€ 47,00
Literatura FoiroC	€ 56,00
La Ondo de EsperantoD	€ 15,00
MonatoC	€ 67,00
Monato (aerea).....C	€ 69,00
MonatoD	€ 38,00
EsperantoD	€ 45,00
KontaktoD	€ 25,00
Heroldo de EsperantoC	€ 59,00
Heroldo de Esperanto (4 numeroj)C	€ 26,00
Heroldo de EsperantoD	€ 29,00
Heroldo de Esperanto (4 numeroj)D	€ 13,00

(*) per questi abbonamenti (in rete) è indispensabile comunicare l'indirizzo mail.

110° UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Brno - Ĉefio 19-26 julio 2025

	fino al 31.11.2024	fino al 31.03.2025	fino al 30.06.2025
1 - individua membro de UEA (ne inkluzivas MG)	€ 190	€ 240	€ 290
2 - ne individua membro de UEA	€ 240	€ 300	€ 360
3 - komitatano, kunulo, junulo, handikapulo, mem individua membro de UEA	€ 95	€ 120	€ 145
4 - kunulo, junulo, handikapulo ne individua membro de UEA	€ 145	€ 180	€ 215

Le date di scadenza sono riferite alle date del pagamento della quota di iscrizione.

PAGAMENTI alla FEI:

- CC Banca Intesa Sanpaolo – IBAN: IT74 I030 6909 6061 0000 0119 380
- CC presso UEA iefa-p
- paypal: financoj@esperanto.it (con la formula "pagamento ad amici e parenti")

Per contattarci:

- telefono: 02.58.100.857
- posta elettronica: feisegreteria@esperanto.it
- orario di apertura ufficio: martedì e giovedì 9.00 – 17.00

Nel ringraziare tutti i soci ed i gruppi per la loro disponibilità ricordiamo che la segreteria è a vostra disposizione per qualsiasi evenienza.

La Segretaria
Anna Carrera

ĈU VI ŜATAS TRADUKI?

Itala Esperanto-Federacio organizas por la jaro 2025 literaturan tradukkonkurson de la itala al Esperanto. La konkurso konsistas el du branĉoj: poezio: maksimuma longo ne fiksita; prozo: (rakonto, novelo) maksimuma longo 10.000 tajperoj. La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn por ĉiu branĉo. La rezultoj estos anoncataj enkadre de la 91-a itala kongreso de Esperanto, dum specifa programero. Ĉiu persono rajtas konkursi por ĉiu branĉo per maksimume du verkoj, kies tradukoj devas esti neniam antaŭe

eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso en la sama branĉo dum la sekvaj tri jaroj. La konkursaĵojn, kune kun la originaloj, oni sendu al la sekretario, Valerio Dalla, prefere per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la branĉon, la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson. Se tio ne eblas, oni sendu ilin papere al la adreso Federazione Esperantista Italiana, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia, indikante sur la koverto "literatura konkurso" kaj enmetante la kontribuaĵo(j)n kaj la originala(j)n tradukita(j)n verko(j)n sen ajna indiko kaj notante en aparta folio ĉiujn necesajn indikojn kiel supre. Premioj: la gajnintoj de la unua premio de la du branĉoj ricevos akvaforton originale verkitan por la premio Zamenhof; por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj libroj. La unua premio en la branĉo "poezio" havas titolon "Gaudenzio Pisoni"; la unua premio en la branĉo prozo havas titolon "Lina Gabrielli". La disdono de la premioj okazos dum la koncerna kongresa programero; se premiito ne ĉeestos ĝin, li estos kontaktata pri la livero. Limdato por la sendado estas 31-a de majo 2025. Juĝkomisiono: prezidanto: Laura Brazzabeni, sekretario: Valerio Dalla; por branĉo poezio: Tiberio Madonna kaj Nicola Ruggiero por branĉo prozo: Carlo Minnaja kaj Maria Rosaria Spanò. La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio. La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo. Por pliaj informoj: concorso@esperanto.it FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia

REGULARO KONKURSO ĜANFRANKO

Itala Esperanto-Federacio, por omaĝi Gianfranco Molle, la plej faman italan kantiston, tutmonde konatan, animon de "Muzika Kulturo", organizas konkurson pri kanzonoj originale verkitaj en Esperanto. La komisiono povos asigni maksimume tri premiojn. La rezultoj estos anoncitaj enkadre de la 91-a itala kongreso de Esperanto, dum specifa programero. Ĉiu persono rajtas konkursi per maksimume tri verkoj, kiuj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). Maksimuma daŭro de kanzono estas 5 minutoj. La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso dum la sekvaj tri jaroj. La konkursaĵojn oni sendu al la sekretario, Valerio Dalla, per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson; ili estu kantitaj kaj luditaj en aŭda formato mp3 aŭ ogg, kaj skribitaj (nur vortoj, eventuale kun akordoj) en teksta formato doc aŭ odt. Premioj: la gajninto de la unua premio, premio Ĝanfranko, ricevos monpremion de 200,00 eŭroj; por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj KD-oj. Limdato por la sendado estas la 30-a de majo de la koncerna jaro. Juĝkomisiono: prezidanto: Laura Brazzabeni, sekretario Valerio Dalla, juĝantoj: Pierluigi Cinquantini, Martin Wieser, Flo Martorell. La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio. La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo. Por pliaj informoj : concorso@esperanto.it FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia

HE, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON!



Ni estas en Kumbrio, en nordokcidenta Anglio. Tie loĝis la Kimroj. Venis la Saksoj, kaj demandis al la Kimroj kiu estis la nomo de tiu monteto. Ili respondis "Pen", kiu estas kimra por "monteto". La Saksoj aldonis la propran vorton por "monteto", kiu estas "Tor", kaj jen la nomo iĝis "Torpen", kio estas "Monteto Monteto". Poste venis la Vikingoj, kiuj faris la samon, kaj aldonis la propran vorton, "Haugr", kiu signifas "monteto", do "Torpen Haugr", kaj jen "Monteto Monteto Monteto". Fine venis la Angloj, kiuj unuigis propralingve la nomon al "Torpenhow", kaj aldonis "Hill", por klarigi ke temas pri monteto. Do, "Torpenhow Hill" estas... "Monteto Monteto Monteto Monteto"!